




# Boletín

n° 405 *Januario - Marto 2014*



# Boletín

Bulteno de Hispana Esperanto-Federacio  
Aperanta de 1949  
Numero 405

---

Redakto-skipo  
Direktado kaj kompostado: Ángel Arquillos  
López  
Revizio: Alejandro Pareja

Retadreso de la bulteno:  
bulteno@esperanto.es

\*Pri la enhavo de la artikoloj respondecas  
nur la respektivaj aŭtoroj

\*La redakcio rajtas rifuzi nepetitajn artikolojn

\*Republikado de enhavo nur permesita kun  
permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro

---

## Hispana Esperanto-Federacio *Federación Española de Esperanto*

Rodríguez San Pedro, 13, 3º, 7  
ES-28015 Madrid  
admin@esperanto.es  
Bankokonto BBVA: ES85 0182 1252 31  
0204011961

Poŝtelefono: +34 638 547 104  
Telefono: +34 914 468 079 (bv. Lasi  
mesaĝon en la aŭtomata respondilo)

---

### Estraro

**Prezidanto:** José Antonio del Barrio  
**Vicprezidanto:** Ángel Arquillos López  
**Sekretario:** Félix M. Jiménez  
**Kasisto:** Raúl Mtnez. Anguita  
**Voĉdonantoj:** Eduardo Berdor  
Juan José Vera  
Jesús García Cano

---

Presejo: Gráficas Notivol (Zaragoza)  
DL: M-39811-2012

---

---

# Salutvortoj

Nia unua numero de la jaro 2014 alvenas  
sufiĉe densa, plena je oficialaj alvokoj  
kaj de informoj pri nia ĉiam pli  
alproksimiĝanta Kongreso. Vi trovos ene  
la alvokon al nia Ĝenerala Kunveno, kun  
la informoj pri la agado kaj kontoj de la  
pasinta jaro, kaj kun proponoj por tiu ĉi.  
Ni deziras inviti ĉiujn membrojn de HEF  
partopreni la kunsidon de la asocio, kaj  
kunlabori en la agado. En tiu ĉi numero  
vi trovos la agadliniojn kiujn la estraro  
aprobis por tiu ĉi jaro, kaj kiujn ni ŝatus  
diskuti kun vi ĉiuj.

La partopreno en la HEF-Kunveno estos  
krome ŝanco ĝui nian kongreson en  
Arundo (Ronda). Ni ne dubas ke ĝi estos  
plene sukcesa. Jam du monatojn antaŭ  
ĝia komenco aliĝis pli ol 100 homoj, kio  
certe estas rekordo en la lastatempaj ja-  
roj. En tiu ĉi Boletín vi povos legi  
sufiĉe prilaboritan proponon de programo,  
plena je kulturaj kaj distraĵaj eroj, kiujn  
riĉigos lokaj kaj regionoj artistoj. Ni  
certe renkontos agrablajn surprizojn.

Surprizojn alispecajn vi trovos en tiu ĉi  
Bulteno. Kelkajn kuriozajn, kiel la uzo  
de Esperanto por festi Karnavalon en An-  
daluzio. Aliajn tre esperigajn, kiel la  
preskaŭ samtempa komenco de kursoj en  
mezgrandaj urboj, kiel Arundo mem, Te-  
ruelo aŭ Valdemoro. Ĉio ĉi pruvas ke la  
intereso por Esperanto eliras el la plej  
tradiciaj medioj kaj fariĝas ĉeŝflua.

Ni ne forgesas la memoron pri niaj pioni-  
roj. Omaĝo al Juan Régulo Pérez, kies  
centan datrevenon ni kunmemoros dum  
tiuj ĉi tagoj estas meritita kaj oportuna.  
Ĝis baldaŭ do en Arundo!

*José Antonio del Barrio*  
*Prezidanto de HEF*

# Enhavo

Salutvortoj	1
Ordinara Ĝeneral Kunsido	3
Cuentas, Pérdidas y Ganancias	4
Raporto pri aktivaĵo en 2013 (resumo)	6
Agadlinioj por 2014	9
Presupuestos 2014	11
Eŭropa komisiono diskriminacias junularajn asociojn laŭ la lingvo	13
Kongresurboj	16
Esperanto triumfas en andaluziaj karnavaloj	18
Programo de la kongresoj	19
Ker Ekzamenoj dum la próxima Kongreso de Esperanto en Ronda	21
Dokumentoj alvenintaj al la Biblioteko en 2013	21
Iom pri la 3-a Ĝenerala Kunsido de Eŭropeana	26
Cent datreveno de Don Juan Régulo Pérez	28
La soneto amo konstante de Francisco d Quevedo	30

---



Ĉi tiu virino estas María Villalón kaj ŝi kantos dum la Andaluzia kaj Hispana Kongresoj de Esperanto, 1 - 4 majo 2014 en Arundo (Ronda), ne nur en la hispana! Ŝi kantas ankaŭ en Esperanto!

Ŝi estas FAMA KANTAŬTORINO el Arundo, kiu gajnis la programon "Factor X" (Faktoro X) en 2007 en la televidkanalo CUATRO. Ŝi belege kantas kaj multaj el siaj konataj kantoj estos ankaŭ en Esperanto dum la Kongreso!

Aŭskultu ŝin en la hispana en "La Lluvia": <https://www.youtube.com/watch?v=tzZO6SF6plc>

Kaj dum Factor X en "Enamorada": <https://www.youtube.com/watch?v=GqFA5vAu83M>

Belega voĉo, ĉu ne?

Web en castellano: <http://arundakongreso2014.wordpress.com/>

Retejo en Esperanto: <http://arundakongreso2014.wordpress.com/>

---

---

# ORDINARA ĜENERALA KUNSIDO

La Prezidanto alvokas vin ĉeesti Ordinaran Ĝeneralan Kunsidon, kiu okazos la 4-an de majo de 2014 (dimanĉe), je la 9:30 horo (je la 10:00 horo dua alvoko), en la “Palacio de Congressos” de Ronda, (Málaga), laŭ la jena tagordo:

- 1.- Legado kaj aprobo de la protokolo de la antaŭa kunveno (5 majo 2013).
- 2.- Aprobo de la kontoj kaj kas-stato de 2013.
- 3.- Aprobo de la Raporto pri aktivajoj de 2013.
- 4.- Informo pri la anaro.
- 5.- Aprobo de la Agadlinioj 2014.
- 6.- Aprobo de la Buĝeto por 2014.
- 7.- Kotizoj por la jaro 2015.
- 8.- Aprobo de la Regularo por la Hispanaj Kongresoj.
- 9.- Kreado de la Instruista-Faka Sekcio de HEF.
- 10.- Sugestoj kaj demandoj.

GRAVA RIMARKO: La membroj de HEF, kiuj deziras esti reprezentataj fare de iu alia membro, bonvolu transdoni mesaĝon informante pri tio, klare indikante la kompletan nomon de la reprezentanto kaj de la reprezentato, al HEFa retpoŝta adreso [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es), aŭ per ordinara poŝto al la oficejo de la asocio, antaŭ la 25a de aprilo.

La Prezidanto de HEF  
José Antonio del Barrio Unquera

## ASAMBLEA GENERAL ORDINARIA

El Presidente les invita a asistir a la Asamblea General Ordinaria, que tendrá lugar el domingo 4 de mayo de 2014, a las 9:30 horas (a las 10:00 en segunda convocatoria) en Palacio de Congressos de Ronda, Ronda (Málaga), con el siguiente orden del día:

- 1.- Lectura y aprobación del acta de la anterior asamblea (5 de mayo de 2013).
- 2.- Aprobación de las cuentas y Tesorería del 2013.
- 3.- Aprobación de la Memoria de actividades de 2013.
- 4.- Informe sobre los socios.
- 5.- Aprobación del Plan de Acción para 2014.
- 6.- Aprobación del Presupuesto para 2014.
- 7.- Cuotas para el año 2015.
- 8.- Aprobación del Reglamento de Congressos.
- 9.- Creación de sección especial para la enseñanza.
- 10.- Ruegos y preguntas.

IMPORTANTE: Los miembros de la Federación que deseen ser representados por algún otro socio, por favor que envíen un mensaje comunicándolo, indicando claramente el nombre completo del representante y representado, al buzón electrónico [admin@esperanto.es](mailto:admin@esperanto.es) o bien por correo postal a las oficinas de la asociación, antes del 25 de abril.

El Presidente de HEF  
José Antonio del Barrio Unquera

# CUENTA DE PÉRDIDAS Y GANANCIAS

	<u>2013</u>	<u>2012</u>
<b>A) GASTOS</b>	<b>8.159,54</b>	<b>5.129,69</b>
1. Aprovisionamientos	574,43	0,00
610. Variación Existencias	574,43	0,00
2. Servicios Exteriores	7.585,11	5.129,69
622. Reparaciones y Conservación	0,00	36,29
625. Seguro	102,41	97,95
626. Comisiones Bancarias	454,38	223,26
627. Publicidad, Propaganda y Fines Sociales	5.458,84	3.179,17
<i>a) Boletín</i>	3.258,23	1.474,64
<i>c) Donativos Libros</i>	84,60	0,00
<i>d) Cuota UEA</i>	161,41	148,72
<i>e) Folletos y Propaganda</i>	0,00	474,50
<i>f) Congresos y Encuentros</i>	890,37	412,51
<i>f.2) Encuentro Ibérico</i>	890,37	412,51
<i>g) Mantenimiento Página Web</i>	880,66	623,10
<i>h) Exposiciones y conferencias</i>	183,57	0,00
<i>i) Gastos de viaje</i>	0,00	45,70
628. Suministros (Electricidad)	125,93	137,50
629. Otros Servicios	1.443,55	1.455,52
<i>a) Comunidad de Vecinos</i>	619,26	631,20
<i>b) Teléfono e Internet</i>	677,80	645,23
<i>c) Correo</i>	106,24	135,21
<i>d) Material Oficina</i>	29,00	32,74
631. Tributos	11,25	11,14
<b>B) INGRESOS</b>	<b>9.196,62</b>	<b>6.171,51</b>
1. Ingresos de la Actividad Propia	8.389,04	6.066,19
721. Cuotas de Socios y Congresos	7.704,04	5.654,00
<i>a) Cuotas Socios</i>	5.692,00	5.472,00
<i>b) Cuotas por uso del Local</i>	150,00	150,00

<i>c) Abonos al Boletín</i>	64,00	32,00
<i>d) Ingresos Congreso Nacional</i>	693,04	0,00
<i>e) Ingresos Congreso Ibérico</i>	1.105,00	0,00
726. Donaciones Otros Socios	685,00	412,19
2. Otros Ingresos	779,95	50,00
759. Prestaciones Servicios (Venta de libros, camisetas, cursos...)	779,95	50,00
3. Ingresos Financieros	27,63	55,32
769. Intereses Depósito BBVA	27,63	55,12
769. Intereses Cuenta Paypal	0,00	0,20
<b>RESULTADO</b>	<b>1.037,08</b>	<b>1.041,82</b>

### BALANCE DE SITUACIÓN

<u>ACTIVO</u>	<u>2013</u>	<u>2012</u>
<b>A) ACTIVO NO CORRIENTE</b>	<b>62.390,91</b>	<b>62.390,91</b>
II. Inmovilizado material	62.390,91	62.390,91
1. Terrenos y construcciones	60.101,21	60.101,21
211. Construcciones	60.101,21	60.101,21
2. Otro inmovilizado material	2.289,70	2.289,70
232. Biblioteca	2.289,70	2.289,70
<b>B) ACTIVO CORRIENTE</b>	<b>39.321,85</b>	<b>38.873,20</b>
II. Existencias	3.121,32	3.695,75
300. Libros y material diverso	3.121,32	3.695,75
III. Usuarios y Deudores Varios	748,43	310,00
3. Patrocinadores, Afiliados y Otros Deudores	748,43	310,00
V. Inversiones financieras a corto plazo	-	23.000,00
566. Depósitos constituidos a corto plazo	-	23.000,00
VII. Efectivo y otros activos líquidos equivalentes	35.452,10	11.867,45
1. Tesorería	35.452,10	11.867,45
570. Caja, euros	97,25	219,19
572. Bancos e instituciones de crédito c/c vista, euros	35.354,85	11.648,26

<b>TOTAL ACTIVO</b>	<b>101.712,76</b>	<b>101.264,11</b>
<b><u>PASIVO</u></b>	<b><u>2013</u></b>	<b><u>2012</u></b>
<b>A) PATRIMONIO NETO</b>	101.680,76	100.643,68
<b>A1) Fondos propios</b>	101.680,76	100.643,68
<b>I. Capital</b>	100.643,68	99.601,86
<b>101. Fondo Social</b>	100.643,68	99.601,86
<b>VII. Resultado del ejercicio</b>	1.037,08	1.041,82
<b>C) PASIVO CORRIENTE</b>	32,00	620,43
<b>V. Acreedores comerciales y otras cuentas a pagar</b>	32,00	620,43
<b>3. Acreedores varios</b>	32,00	620,43
<b>TOTAL PATRIMONIO NETO Y PASIVO</b>	<b>101.712,76</b>	<b>101.264,11</b>

## **RAPORTO PRI AKTIVAĴOJ EN 2013 (RESUMO)**

### **1. ADMINISTRADO**

1.1. La estraro kunsidis 7 fojojn.

1.2. Okazis unu ĝenerala kunveno, ordinara, majo la 5an 2013, por aprobi kontojn kaj raporton 2012, inter aliaj aferoj.

### **2. PERIODA ELDONADO**

2.1. Oni eldonis kvar numerojn de “Boletín”.

### **3. KURSOJ**

3.1. Membroj de HEF gvidis kursojn en kelkaj urboj tra la tuta ŝtato.

### **4. KONGRESOJ kaj RENKONTIĜOJ**

4.a Organizitaj de HEF aŭ ĝiaj aliĝitaj asocioj

4.a.1. 9<sup>a</sup> IRO en Madrido (junulargastejo “San Fermín”), 15a-17a de marto, organizita de HEJS kune kun KEJ kaj PEJ. Temo: “Bohemiaj Lumoj”. Partoprenis kvindekda homoj.

4.a.2. 72<sup>a</sup> Hispana Kongreso en Zaragozo, 3<sup>a</sup>-5<sup>a</sup> de majo, organizata de la loka grupo “Frateco”. Devizo de la Kongreso: “Lingvo kaj sento”. Partoprenis ĉirkaŭ 100 homoj.

4.a.3. 21<sup>a</sup> Internacia Esperanto-Semajno de Kulturo kaj Turismo en Lloret de Mar (Ĝirono), 5a-12a oktobro.

4.a.4. 15a Decembro: E-asocioj apartenantaj al HEF festis la Zamenhofan Tagon tra la tuta ŝtato.

4.b Partoprenataj de membroj de HEF

4.b.1 Valencia E-Renkontiĝo en Olivo (Valencilando), organizata de la nova loka grupo, 21a-23a de junio.

4.b.2. 98<sup>a</sup> Universala Kongreso en Reikjaviko (Islando), 20a-27a julio.

4.b.3. 86<sup>a</sup> SAT-Kongreso en Madrido, 28<sup>a</sup> julio ĝis 4<sup>a</sup> aŭgusto. Multaj HEF-anoj partoprenis profitante ĝian okazigon en Hispanio. HEF kunlaboris pere de la ekspozicio de paneloj kaj diskonigo de la evento.

4.b.4. 36a Kataluna kaj 1a Okcitan Kongreso E-o en Salardú (Valo de Arán, Katalunio), 1-3 de novembro.

## 5. DISVASTIGO I: ekspozicioj, prelegoj, foiroj

5.1. Ekspozicioj de Paneloj: 4 en Madrido: Junulargastejo “San Fermín” dum januaro kaj Publika Biblioteko “Jose Hierro” dum julio, ambaŭ en la distrikto Usera, restadejo “Colegio Mayor Chaminade” (Ciudad Universitaria) dum aŭgusto (okaze de la 86<sup>a</sup> SAT-Kongreso), kaj sidejo de la “Asociación de Vecinos de Manoteras” dum novembro. 1 Ekspozicio en Kantabrio, en la urbo Argoños, aŭguste.

## 6. DISVASTIGO II: aliaj

6.1. Kelkaj membroj daŭre kontribuis al la redaktado de Vikipedio en e-o, ĉu pere de novaj artikoloj, ĉu plibonigante iujn jam ekzistantajn.

6.2. Tradicia legado de “Don Kihoto” dum la Internacia Tago de la Libro (23a aprilo), du HEF-anoj legis kielkjan paragrafojn el la komenco de la dua parto.

6.3. Dum omaĝo al la scientistino Marie Sklodowska Curie en la junulargastejo “San Fermín” pere de prezentado de biografia libro (hispane) far de Belén Yuste kaj Sonia L. Rivas Caballero, oni legis citaĵojn de la fama polino en e-o.

## 7. AMASMEDIOJ

7.1. Intervjuo en la televidstacio “La Sexta” al kelkaj HEF-anoj okaze de la Hispana Kongreso en Zaragozo, komence de majo. Aperis novaĵoj pri la kongreso ankaŭ en diversaj lokaj kaj regionaj amaskomunikiloj.

7.2. Radio Vallecas: daŭra kunlaboro de membro de HEF kun ĉi radiostacio rilate al e-o ĝenerale.



7.3. Diversaj mencioj pri e-o aperis dum la jaro en kelkaj ĵurnaloj, menciindas la 18a marto en “Deia” pri la centjariĝo de la bilbaa HEF-ano Eduardo Larrouy.

## 8. INTERRETO

8.1. La retpaĝaro de HEF komencis grandan renovigon ekde oktobro, renovigo kiu daŭros dum 2014. La ĉefa celo estas adaptigi ĝin al porteblaj telefonoj kaj tabulkomputiloj, sed alia celo estas plurlingvigi ĝin pere de materialo en kataluna, eŭska, galega kaj astura.

8.2. La Estraro lanĉis oktobre la “Bitbulteno”-n, informilon sendatan restpoŝte al la anaro kaj aliaj interesatoj. Ĝi estas dulingva (hispana kaj esperanta).

8.3. Sociaj retoj : HEF, HEJS kaj kelkaj el ĝiaj anoj havas kontojn en youtube, Facebook, Twitter kaj Tuenti (ĉi lasta nur el HEJS), kiuj estas regule uzataj por disvastigi informojn pri aktivaj kaj pri E-o.

## 9. BIBLIOTEKO KAJ BITOTEKO

9.1. Biblioteko *Juan Regulo Pérez*: Ĝi daŭre estas alirebla de ĉiuj, tamen nur HEF-anoj rajtas prunt-preni. La katalogo estas disponebla pere de la HEF-retpaĝo. Dum 2013 novaj ekzempleroj estis aldonitaj al la kolekto.

9.2. Bitoteko: Dum 2013 oni aldonis pli da materialo, kaj ĝi akiris agnoskon ene de la Esperanta Mondo: en la 30a de novembro ĝia respondeculino Ana Manero prezentis ĝin en la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo. Ekde la 15a marto la dokumentoj de Bitoteko estas troveblaj en *Euro-peana*, projekto de la Eŭropa Unio por krei publikan eŭropan bitotekon konsistantan el bibliotekaj, muzeaj kaj arĥivaj dokumentoj.

## 10. KUNLABORO KUN OFICIALAJ INSTANCOJ KAJ PRIVATULOJ

10.1. Ana Manero prezentis la projekton Bitoteko nome de HEF ĉe la 3a Ĝenerala Jarkunsido de la Reto *Europeana*, en Roterdamo (Nederlando), decembro la 2an.

## 11. ALIAJ AKTIVAĴOJ

11.1. Jorge Camacho, membro de HEF, gajnis la premion “Luigi Minnaja” en la Belartaj Konkursoj de UEA 2013 pro sia verko “De hajko al hajko”, kaj ankaŭ ricevis de UEA Diplomon pri Elstara Arta Agado “pro kontribuo al la originala Esperanto-Literaturo”.

11.2. Du membroj de HEF prezentis librojn dum 2013: Miguel Fernández “Poezio: armilo ŝargita per futuro”, eldonita de SATeH, kaj Jorge Camacho “En la profundo”, eldonita de Mondial.

Originalo subskribita de la sekretario Félix Manuel Jiménez Lobo.

# AGADLINIOJ POR 2014

En sia kunveno de januaro 2014, la estraro de Hispana Esperanto-Federacio aprobis siajn agadliniojn por la jaro 2014, surbaze de kiuj ĝi laboros kaj kiujn ĝi prezentos por diskuto kaj eventuala konfirmo al la Ĝenerala Kunveno de la asocio.

## A. Kutimaj nepraj agadoj

### 1. Varbado de novaj membroj

La estraro entreprenos agadojn por helpi la aliĝon de membroj al HEF, post la daŭra malkresko dum la lastaj jaroj.

Celo: 200 membroj kotizantaj je la fino de 2014.

Speciala atento: junuloj; celo: 20 membroj en HEJS (malpli ol 30-jaraj)

Alia celo: kreskigi la aniĝon kaj la aktivadon de virinoj en HEF; fari la asocion altira, kaj pretigi la vojon por la ĉeesto de virinoj en la venonta estraro de HEF.

Respondeculo: ĉiuj, sub kunordigo de kasisto kaj sekretario

Datoj: la tuta jaro, ĉefe dum unuaj tri monatoj.

### 2. Kongreso

HEF apogu la organizantojn de la kongreso en Arundo, ĉefe per varbado kaj diskonigo. Celo: almenaŭ 100 ĉeestantoj.

Pri kvalito; ebleco fari enketon je la fino de la kongreso, kun opinioj pri la rezulto kaj sugestoj. Respondeculo: vicprezidanto

Alia celo: Difino de loko de venonta kongreso 2015 jam dum la ĉijara kongreso.

Aktualigado de dokumento pri organizado de hispanaj kongresoj, kaj aprobo de regularo. Respondeculo: prezidanto. Aprobo de regularo dum la ĉitiam kongreso.

### 3. Boletín

Eldono de kvar numeroj de "Boletín". La bulteno alvenu akurate. Kreado de kalendaro kun ĉiuj fazoj de ĉiu numero. Respondeculo: Redaktoro

Kvalito: Studi la dezirojn de la legantoj, eble per enketo en iu numero.

Kvalito de la presado: Studi aliajn alternativojn al nuna presejo. Kompari kostojn.

Krei version adekvatan por legi en elektronikaj legiloj, kaj komenci sendi al la anoj kaj enretigi en la internan spacon.

### 4. Retejo

Fino de la renovigo de la retejo.

Modifon de la aspekto de la Vortaro kaj la Bitoteko.

Funkciigo de la interna spaco

Celo: duobligi nombron de vizitoj

Diskonigi pli en eksteraj medioj.

Respondeculo: retejestroj.

## 5. Retaj medioj

Intensigi la agadon en la sociaj retoj.

Celo: duobligi la nombron de sekvantoj/ŝatantoj (tio estas: 1200 en Fejsbuko, 800 en Tüitero, 450 en Guglo+ je la fino de la jaro)

Forumoj: Partopreni regule en esperantaj forumoj.

Nomumi respondeculon pri retaj medioj.

Aplikaĵoj: krei almenaŭ unu aplikaĵon por lertelefonoj pri HEF.

## 6. Biblioteko

Sideja kolekto: studi la manieron reorganizi la spacon ĉar la kolekto daŭre kreskas kaj ni baldaŭ alvenos al problema situacio.

Ĝisdatigi akurate la bibliotekan retejon, ĉefe la Tradukotekon.

Plue atenti la petojn alvenantajn, ĉefe per retroŝto.

Resti en kontakto kun aliaj kolegoj pere de la bibliotekista listo.

Respondeculo: komisiito pri Biblioteko

## 7. Gazetaro

Gazetaro: sendi almenaŭ dudek komunikojn aŭ informojn jare al la gazetaro.

Kompletigi datumbazon de gazetoj, kaj krei kontakton kun individuaj ĵurnalistoj

Fari trejnsejlon por kontakto kun amaskomunikiloj, kaj informo tie, kun la celo plibonigi la kvaliton kaj ampleksigi la nombron de homoj tie aperantaj.

Respondeculo: komisiito pri gazetaro.

## 8. Propagando

Ekspozicioj: Celo: prezenti la ekspozicion en 15 lokoj en la tuta Hispanio. Respondeculo: grupoj sub instigo de estraro.

**Prelegoj:** 10 prelegoj en diversaj lokoj de Hispanio. Prioritato: lernejoj kaj universitatoj

Respondeculo: aliĝintaj asocioj

## 9. Informa materialo

Broŝuroj: krei unu broŝuron por junuloj kaj alian pri la reto

Videoj: Plu flegi la kanalon de Jutubo. Krei propagandajn videojn en la hispana pri Esperanto.

Celo: duobligi la nombron de sekvantoj/ŝatantoj (nun 200 abonantoj)

## 10. Junularo

Plifirmigo de HEJS. Celo: 20 membroj kotizantaj (vidu supre).

Celebrado de unu kunveno de membroj.

Partoprenado en internaciaj asocioj (TEJO)

Partoprenado en forumoj kaj renkontoj.

Respondeculo: Voĉdonanto-prezidanto de HEJS.

## 11. Financo

Serĉi aliajn vojojn novajn por akirado de rimedoj. Donacado en la reto

Prezenti subvencipetojn al instancoj en Eŭropo kaj Hispanio. Celo: almenaŭ tri petojn.

Lanĉi kampanjon por trovi financadon por Bitoteko

Studi eblecon serĉi stipendion

Respondeculo: kasisto

## B. Projektoj

### 1. Kunordigo de instruado

Kreado de reto de instruantoj, por kunordigi agadojn en Hispanio  
Kreado de instruista fako, kaj aliĝo al ILEI kiel filio en Hispanio  
Celebrado de almenaŭ unu KER-ekzameno en Hispanio.  
Respondeculo: voĉdonanto-kunordiganto pri instruado

### 2. Bitoteko

Ŝanĝi la metadatenan modelon por Europeana de ESE al EDM, sekvante la indikojn de la Ministerio.

Aldoni bildetojn al niaj rekordoj por ke ili estu pli videblaj en Europeana.

Renovigi la fasadon.

Bitigi almenaŭ 25 pliajn librojn.

Daŭrigi la kunlaboron kun aliaj kolegoj por kreskigi la bitotekan kolekton per dokumentoj alvenantaj el aliaj fontoj.

Katalogo: Instali provversion de Koha por studi la programon kun la celo migri la katalogon de Openbiblio al tiu pli potenca mastrumsistemo.

### 3. Eŭropo

Profiti la eŭropajn elektojn kaj agadojn por fari kampanjon pri Esperanto en Eŭropa Unio. Kontakti kandidatojn kaj partiojn. Kontakti reprezentantojn de eŭropaj institucioj en Hispanio.

Respondeculo: prezidanto.

### 4. Eldonado

Krei eldonan fakon de HEF, koncentriĝante ĉefe pri elektronikaj libroj. Eldoni du librojn en la hispana.

Reeldoni almenaŭ kvar librojn en legeblaj kaj adaptitaj formatoj. Pretigi bitlibran version de Donkiĥoto.

Respondeculo: nomumota.

## PRESUPUESTOS 2014

### GASTOS

#### 2. Aprovisionamientos

(Compra de libros, de material didáctico y variación de existencias) 400,00 €

#### 4. Otros Gastos de la Actividad

Servidor y Dominios Internet 920,00 €

Reparaciones y Mantenimiento 40,00 €

Primas de Seguros 110,00 €

Comisiones Bancarias y Similares 300,00 €

Cuota UEA 170,00 €

Congresos	200,00 €
Otras Campañas y Publicidad	2.000,00 €
Suministros (electricidad)	130,00 €
Teléfono	670,00 €
Correo	150,00 €
Gastos Varios	150,00 €
<b>TOTAL GASTOS</b>	<b>7.940,00</b>

## INGRESOS

1. Ingresos Afectos a la Actividad	
Prestaciones de Servicios (Venta de libros, cursos...)	500,00 €
Cuotas y Congresos	6.440,00 €
5. Otros Ingresos de la Actividad	
Subvenciones y Donaciones	1.000,00 €
<b>TOTAL INGRESOS</b>	<b>7.940,00</b>
<b>RESULTADO DEL EJER CICIO</b>	<b>-</b>

## “BOLETÍN” EN LA INTERNA SPACO DE NIA RETEJO

La membroj de Hispana Esperanto-Federacio kiuj tion petos, povas jam aliri la internan spacon de la retejo de la asocio. Jam troviĝas tie la kvar lastaj numeroj de nia bulteno “Boletín”, en bita formato, kaj tie vi povos de nun trovi la elektronikan eldonon de la lasta numero, kiun vi povos legi antaŭ ol la poŝto havigos al anoj la paperan eldonon.

Ankaŭ gastos en tiu interna spaco la protokoloj de la estrarkunvenoj kaj aliaj internaj dokumentoj.

Por aliri, sendu vian peton al la adreso [esperanto@esperanto.es](mailto:esperanto@esperanto.es) kaj vi ricevos la pasvortojn kaj instrukciojn.

Memoru ankaŭ ke por partopreni pli en nia aktivado, membroj de HEF povas aliĝi al la retlisto de *HEF-anaro*, en la adreso <http://groups.yahoo.com/groups/hef-anaro/>, kie oni ricevos la informojn de la estraro, kaj oni mem povos rekte kunlabori en la interna vivo de la asocio.

HEF

# EŬROPA KOMISIONO DISKRIMINACIAS JUNULARAJN ASOCIOJN LAŬ LA LINGVO

En decembro la Eŭropa Komisiono publikigis la gvidlibron de la nova programo Erasmus+, kiu estas la kadra programo de Eŭropa Unio pri edukado, trejnado, junularo kaj sporto de 2014 al 2020. La entuta buĝeto de la programo Erasmus+ estas 14,77 miliardoj da eŭroj. Temas pri gravega kaj ampleksa programo, kiu financas, interalie, internaciajn kunlaboradojn kaj iniciatojn de eŭropaj junularaj asocioj, transnacion trejnadon kaj studentan moveblon.

Erasmus+ estas programo malfermita al ĉiuj, grandaj aŭ malgrandaj asocioj, neregistaraj organizoj, publikaj instancoj, kaj ne nur al fakuloj. Tamen, la gvidlibro kaj la regularo de Erasmus+ haveblas nur en la angla. Temas pri pli ol 200 paĝoj kiuj enhavas la detalan priskribon de la kompleksaj proceduroj por akiri financan subtenon de Eŭropa Unio. La tradukoj en la aliaj 23 oficialaj lingvoj de EU ne haveblas, kaj laŭ la Eŭropa Komisiono, ili ne haveblos antaŭ aprilo 2014. La Asocio Nitobe, dediĉita al la defendo de la lingvaj rajtoj, denoncis la diskriminacion aplikitan de la Eŭropa Komisiono, kiu nejuste favoras la denaskajn parolantojn de la angla. Hispana Esperanto-Federacio aliĝis al la protesto kaj sendis al la publikaj instancoj komunikon kun la traduko de la denonco en la hispana lingvo. La letero estis sendita ankaŭ al la oficejo kunordiganta en Hispanio la eŭropajn subvenciojn kaj al la hispaniaj eŭroparlamentanoj.



# PRI GRUPOJ KAJ ASOCIOJ

## Andaluzio (Ronda)

**GRATIS**

# TALLER DE ESPERANTO

EN LA CASA DE LA JUVENTUD

**EL ESPERANTO ES UNA LENGUA INTERNACIONAL QUE PRETENDE LA COMUNICACIÓN ENTRE PERSONAS; NEUTRAL, SENCILLA, DE RÁPIDO APRENDIZAJE, CON IDEALES DE PACIFISMO Y RESPETO A LA DIVERSIDAD.**

**PARA JÓVENES A PARTIR DE 14 AÑOS  
VIERNES DE 18,00 A 20,00 H.  
DEL 21 DE FEBRERO AL 25 DE ABRIL**

**ORGANIZAN**   **COLABORA** 

**MÁS INFORMACIÓN EN**  
CASA DE LA JUVENTUD  
AVDA. SÁLAGRA, 46  
RONDA  
952 877 112  
WWW.JUVENTUDRONDA.ES  
C/RONDA@TELEFONICA.NET

De la 21-an de februaro kaj ĝis la 25-an de aprilo, en la urbo Ronda, kie ĉi jare okazos la du Kongresoj (hispana kaj andaluzaj), Fátima Jiménez, esperantistino de Arundo kaj membro de la LKK, gvidas Atelieron de Esperanto en la domo de la Juneco. Ŝajnas ke la lernantoj estas nombraj kaj la plimulto ĉeestos la kongreson kaj oni esperas ke ili profitos la specialan kurson gvidota de Rafael Mateos dum la tri tagoj kiuj daŭros la kongreson. Sukceson, kaj fruktodonan kurson, kara Fátima.

## Aragono

### TERUELO ANKAŬ EKZISTAS POR ESPERANTO



Kurso de Esperanto komenciĝis en la aragona urbo Teruelo dum la monato marto. Ĝin organizis la kvartala asocio “Asociación de Vecinos de San Julián” (strato Rosario, 50), ĉiujn merkredojn je la 7,30 vespere. La respondeculo estas nia malnova kolego Alberto Granados, kiu arigis bonan grupon de interesigantoj. Vi povas vidi lin kun prezidanto de HEF okaze de ĵusa vizito de tiu ĉi al tiu urbo.

## Vaskio

La sabaton 14-an de decembro, oni okazigis renkontiĝon en nia sidejo por festi la naskiĝtagon de la kreinto de Esperanto. Post kelkaj vortoj de nia Sekretario, kiu resumis la ĉefajn okazintaĵojn de la jaro 2013, alparolis la ĉeestantojn nia amiko Eduardo Larrouy. Plena de entuziasmo, li dankis la organizitan omaĝon okaze de lia 100-jariĝo kaj puŝis nin antaŭen por labori favore al Esperanto.

Post la vortoj alvenis kunmanĝado de la frandaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj kaj viglaj interparoladoj ĉirkaŭ plenplena tablo, finante per bonaj deziroj por la nova jaro.



Nia Ponto

## Madrido

### ESPERANTO EN VALDEMORO (Madrido)

Dank' al la kunlaboro de Publika Biblioteko Ana Maria Matute en Valdemoro (provinco Madrido), kaj ties direktorino s-no Emilia Marchal Salas, oni povas prezenti al la loĝantaro de la urbo ekspozicion pri Esperanto kaj 10-lecionan kurson por komencantoj.

La ekspozicion malfermis en la biblioteko (Avda de España s/n) la 24an de februaro kaj ĝi estos vizitebla ĝis fine de la monato marto. Ĝi konsistas el serio de paneloj kun informo en la hispana pri Esperanto, kaj malgranda elmontrado de esperantaj libroj, komiksoj kaj revuoj.

La kurso por komencantoj estos gvidata de Alejandro Pareja, e-isto kiu loĝas en Valdemoro, kaj daŭros 10 lecionoj. La lecionoj okazos en la biblioteko la merkredojn je la 7:30 p.t.m., kaj la unua leciono estos la 5an de marto. Ĝis nun aliĝis ĉirkaŭ 40 homoj, do ni esperas bonan sukceson.



Radiostacio *Cadena Ser Madrid Sur* intervjuis Alejandro Pareja'n la 24an de februaro pri la ekspozicio kaj la kurso, kaj li profitis por iom disvastigi la konon de Esperanto per tiu komunikilo kiu atingas la sudan parton de la provinco Madrido.



# KONGRESURBOJ:

**2011: San Lorenzo de El Escorial**



**2010: Santiago de Compostela**



**2012: Almagro**



**2013: Zaragoza**



**2014: Arundo**

# 2015: ĈU VIA PROPRA URBO?



LA ESTRARO DE HEF INVITAS LA LOKAJN GRUPOJN KAJ LA ANARON PROPONI KANDIDATURBOJN POR LA HISPANA KONGRESO 2015.

PROponu VIAN PROJEKTON DUM LA ĜENERALA KUNVENO DE LA KONGRESO EN ARUNDO, KAJ LA PARTOPRENANTOJ ELEKTOS UNU INTER ĈIUJ.

NE TIMU PRI LA DEMARŝOJ DE LA ORGANIZADO, LA SKIPO DE HEF HELPOS VIN, SED NEPRE NECESAS HOMOJ SURLOKE KAJ PRO TIO NI PETOS LOKAJN RESPONDECULOJN.

ĜUU LA VENONTJARAN HISPANAN KONGRESON EN VIA PROPRA URBO KAJ PROFITU LA OKAZON POR MONTRI ĜIN AL LA KONGRESANOJ!

# ESPERANTO TRIUMFAS EN ANDALUZIAJ KARNAVALOJ

Muzikbando nomata “Esperanto” kaj utiliganta motivojn rilatajn al la Internacia Lingvo partoprenis dum la Karnavala sezono en diversaj festivaloj de la okcidenta Andaluzio, en Hispanio. Temas pri tiu speciala speco de grupo, nomata “comparsa” en la hispana, tipa de tiu celebrado, kiu maskas sin kaj kantas satirajn pecojn en ofte tre spektataj konkursoj.

Unu tia grupo, devenanta el urbo proksima al Sevilo, Mairena del Alcor, ĉijare utiligis Esperanton kiel bazon de sia masko kaj siaj spektakloj. Ili estis vestitaj verde, kun blankaj steloj, kaj altaj ĉapoj kun vortoj en Esperanto. La scenejo montris tutmondajn figurojn, kaj flagojn de Esperanto kaj diversaj landoj, kun la vorto “Esperanto” en grandaj literoj. Jam de la komenco oni salutis en Esperanto, kaj ankaŭ parto de la kantado kaj de la krioj estis eligataj en tiu ĉi lingvo. La vortoj kaj prononcado ne estis tute ĝustaj, ĉar la partoprenantoj ne estas mem esperantistoj, kvankam probable malmultaj surlokaj spektantoj tion rimarkis.

Fakte, la apero de tiu bando tute surprizis la esperantistojn en la ĉirkaŭaj urboj kaj ĝenerale en tuta Hispanio. Oni unue rimarkis ĝin kiam la registrado de ĝia unua spektaklo, en la urbo La Rinconada, aperis en Youtube. Mi sukcesis kontakti la grupon, kaj interparoli kun la verkisto de la pecoj kaj la muziko, José Manuel Marín, kiu klarigis ke li tute memstare orientiĝis, serĉis la tekstojn per aŭtomataj tradukiloj kaj pretigis la spektaklon, ĉar li simpatiis kun la ideoj pri universaleco kaj unuiĝo. Plejparto de la tekstoj rilatas al la politika aktualeco en Hispanio, kun satiraj aludoj al la sociaj problemoj, sed ankaŭ troviĝas tekstoj pri Esperanto kaj pri tiu universaleco. Nia lingvo estas menciata tute senĝene dum la tuta spektaklo, kvankam ofte en iom kripligita formo, por faciligi komprenon de hispanparolantoj.

La bando sukcesis akiri trian premion en tiu unua festivalo de La Rinconada. Ĝi partoprenis ankaŭ aliajn postajn festivalojn, en aliaj apudsevilaj urboj, kiel Arahal, kie ili gajnis la duan premion, kaj ankaŭ en Onubo (Huelva). Ĉiukaze, pluraj el tiuj spektakloj estas aŭskulteblaj en la reto, sekvante la vortojn “comparsa Esperanto”, aŭ pere de ligiloj en la retejo de Hispana Esperanto-Federacio.

José Antonio del Barrio



# PROGRAMO

## 73-a Hispana kaj 18-a Andaluzia Kongresoj de Esperanto en Arundo (Ronda), 1 - 4 majo 2014

### 1-A DE MAJO (ĴAŬDE)

- 9:30 Akceptado kaj disdonado de dokumentoj kaj Libro-Servo
- 10:30 Nesolena malfermo de la Kongresoj
- 11:00 Interkona mateno kun turisma vizito al Arundo
- 14:00 Libera tempo
- 16:00 Prelego de Miguel Fernández “Esperantigitaj voĉoj de andaluzaj poetoj”  
Prelego de Viktoro Solé pri Muzikaj efektoj (pri la rimedoj, kiujn grandaj komponistoj uzas en siaj grandaj verkoj por tuŝi nin)  
Kurso de Esperanto
- 18:00 Prelego de Rikardo Albert “Kiam la Sudo rigardas Norden”  
Laborkunsido
- 19:00 Prelego de José María Rodríguez pri “Flamenko”
- 20:00 Flamenka Vespero en la Flamenka Rondo (“Peña Flamenca”).  
Kantistoj: Paco Pereña, El Niño del Gastor, Miguel Laín kaj Antonio Sanlúcar  
Gitaristoj: Agustín de la Fuente kaj Miguel Laín  
Dancistino: Virginia Pereña “La Chabuca”
- 22:30 Libera tempo

### 2-A DE MAJO (VENDREDE)

- 9:30 Eta kurso pri Salso por komencantoj fare de Raúl Salinas (1-a sesio)  
Laborkunsido  
  
Kurso de Esperanto
- 10:30 Solena malfermo de la Kongresoj kaj komuna foto
- 11:30 Prezento de libro “mediteraneaj eroj II” de Ángel Arquillos kaj legado de kelkaj poemoj
- 12:30 Prelego de Francisco Javier Moleón pri lingvoj de Afriko

- 13:00 Prelego de Viktoro Solé, "Mansignado per Esperanto" (temas pri nova helpilo por la lernado/instruado de Esperanto)
- Laborkunsido. Prelego por mezlernantoj kiuj vizitos la Kongresejon (jam konfirmitaj en Vélez Málaga kaj en Kanariaj Insuloj)
- 14:00 Libera tempo
- 16:00 Prelego de José María Rodríguez pri "Blas Infante, Naciismo-Internaciismo) Mallonga kurso pri Salso gvidata de Raúl Salinas (2-a sesio)
- 17:00 Prelego de Eduardo Berdor pri "La franca lingvo en Nord-Afriko dum la kolonioj kaj sendependeco)
- 18:00 Nord-Afrika Programero (ĉefrolas nordafrikaj esperantistoj)
- 19:15 Al-Andalusa Koncerto, grupo Tura Al-Ándalus, ĉe la Kongresejo
- 20:30 Libera tempo
- 22:30 (Eksterprogramo) Koncerto de Pablo Carrascal en urba trinkejo

### **3-A DE MAJO (SABATE)**

- 9:00 Duontaga ekskurso (probable al la romia vilaĝo Acinipo, vin-kelo kaj al la proksima vilaĝo Setenil de las Bodegas)
- 14:00 Oficiala bankedo (ĉe la Flameka Rondo, "Peña Flamenka")
- 16:00 Prelego pri la Universala Kongreso en Bonaero fare de Wolfgang Guenther  
Prelego de Félix Manuel Jiménez pri Sociala Ekonomio kaj ĝia rilato kun sociaj movoj.
- 17:00 Prelego de Viktoro Solé pri Muzikaj efektoj (pri la rimedoj, kiujn grandaj komponistoj uzas en siaj grandaj verkoj por tuŝi nin)  
Prelego de José María Salguero "Vikipedio"
- 18:30 Vivu la Teatro, spektaklo pri deklamado de poemoj, teatraĵoj, monologoj, kantoj, humoro, ktp ĉe la urba Teatro, gvidata de Miguel Fernández kaj Ana Manero
- 20:30 Libera tempo
- 22:00 Koncerto de grupo de Esperanto kaj de María Villalón (fama kantaŭtorino el Arundo, kiu kantas kaj en la hispana kaj en Esperanto) ĉe la Flamenka Rondo (Peña Flamenca)
- 24:00 Libera tempo

## 4-A MAJO (DIMANĈE)

10:00 Ĝenerala Kunsido AEU

11:00 Ĝenerala Kunsido de HEF

12:00 Laborrondo por junularaj agadoj (HEJ/AJEU) (konfirmota)

12:30 Solena Fermo de la Kongresoj

---

# KER-EKZAMENO DUM LA PROKSIMA HISPANA KONGRESO DE ESPERANTO EN ARUNDO

Antaŭ dudek jaroj, mi estis ano ĉe tribunalo cele la dungon de novaj laboristoj en mia oficejo. Mi estis reprezentanto de la ceteraj laborantoj kaj mia tasko estis valorigi la diplomojn, kursojn kaj ĉiaspecajn meritojn prezentitajn de la kandidatoj. Imagu la laboron, tiom da poentoj por kurso de informadiko; tiom da ili por kurso de lingvo; tiom por aliaj meritoj... Entute temis pri kvar labor-postenoj sed alvenis centoj da kandidatoj. Lutage, tute laca post valorigi centojn da diplomoj, venis ĉe miaj manoj konata diplomo. Jes, surprize kandidato alportis diplomon certigantan sian konon de la internacia lingvo esperanto.

La reguloj estis tute klaraj, la tribunalestro antaŭe sciigis al mi, ke la kono de lingvoj angla, franca, germana aŭ itala egalas al 10 poentoj. Sed... ĉu same se temis pri kono de esperanto? Mi ne dubis, mi eĉ demandis nenium kaj tiel mi havigis 10 poentojn al tiu kandidato, kiun, mi devas konfesi, ne konis malgraŭ la samideaneco.

La sekvantan tagon, la revizianto de mia laboro nuligis tiujn poentojn, pro la fakto ke esperanto... *reale ne estas idiomo*. Komprenoble, mi protestis. Kia diferenco ekzistis inter diplomo pri kono de la angla lingvo kaj esperanto? Finfine, oni akceptis mian peton, kvankam verdire ne pro miaj argumentoj rilate la ekvivalenton inter la diplomoj, sed ja pro mia amikeco kun la tribunalestro.

Sed, ĉu vere diplomo pri kono de esperanto estas tute valida, ekzemple ĉe instru-institutoj kaj ĉefe ĉe universitatoj? La respondo estas... tio dependas de tiu kiu disdonis la diplomon. Multaj el ni posedas diplomon pri kono de esperanto, atingita okaze de hispanaj kongresoj de esperanto aŭ de tiuj kar-memoraj korespondaj kursoj de *Callosa de Segura*. Oni devas agnoski, ke ĉi tiaj diplomoj certigas, ke oni parolas esperanton, sed ili tute ne validas ekzemple ĉe universitato.

En la jaro 2001 la Konsilio de Eŭropo, kiel ĉefa parto de sia projekto *Lingvolernado por eŭropa civitaneco*, rekomendis, pere de oficiala rezolucio, la utiligon de la ĉefa dokumento de tiu projekto, la tiel nomata "Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj" (KER). Ĉi tiu sistemo, ekde tiam, estas la gvidilo uzata por priskribi la atingojn de lernantoj de fremdlingvoj en Eŭropo. Sed, pri kiuj lingvoj ni parolas? Ĉu la amase instruata angla lingvo? Ĉu la tradicie disvastigita franca idiomo? Ĉu la germana, nova lingvo ĉe multaj privataj lingvo-akademioj? La respondo estas, ke la sistemo KER aplikiga al la instruado de ĉiuj lingvoj. Do, ankaŭ rilate esperanton.

La nova sistemo prezentas 6 referencniveloj:

Baznivela Lingvo-uzanto: A

A1. Unuaj paŝoj A2. Elano

Memstara Lingvo-uzanto: B

B1. Salto B2. Flugo

Profesinivela Lingvo-uzanto: C

C1. Proksime al pinto C2. Pinto.

Ĉi tiuj niveloj estas iomete similaj al la tradiciaj esperantaj: *Elementa-Meza-Perfektiga*.

Kiel dirite, tio vere grava ne nur estas la diplomo atingita, sed ĉefe tiu kiu havigis tiun diplomon, ĉar se privata asocio, ekzemple unu el niaj asocioj, disdonas tiujn diplomojn, verdire tio havas malmulte da valoro ĉe universitato. Do, devus esti la lingva fako de universitato aŭ oficiala lingva instituto, tiu kiu respondecigaŝ rilate la diplomon certigantan la kono de lingvo.

Tio okazas ekzemple pri la angla lingvo, kies unu el la plej valoraj diplomoj estas tiu de la Universitato de Kembriĝo; aŭ rilate la franc-lingvan diplomon de *Alliance Française*; la germana diplomo de *Goethe-Institut*; la itala titolo de la *Accademia Italiana di Lingua* aŭ la portugallingva de la *Instituto Camoens* kaj la *Universidad de Lisboa*. Sed, kio okazas rilate esperanton? Kiu universitato aŭ oficiala lingva instituto havigas al eblaj ekzamenoj diplomon pri kono de la internacia lingvo? En Hispanio tio okazas neniuloke, neniu universitato ekzameniĝas kaj poste disdonas diplomon de esperanto. Do, kien ni devas iri se ni deziras atingi tiun diplomon?

Feliĉe, la hungara ekzamencentro aneksita al la Budapeŝta Universitato Eotvos Lorand, kunlaboro kun Universala Esperanto-Asocio, funkciigis novan ekzamensistemon adaptita al tiu Komuna Eŭropa Referenckadro KER de la Konsilio de Eŭropo. Ĉi tiel, oficiala instanco, tio estas hungara universitato, certigas la konon de esperanto al tiuj kiuj trapasas sukcese la ekzamenon. Do, ne temas pri privata esperantista asocio certiganta tiun aferon.

La novan ekzamensistemon oni lanĉis en la jaro 2008 kaj ĝis la fino de 2013, 1.346 homoj el 61 landoj ekzameniĝis kaj oni disdonis 1.250 diplomojn. La ekzamenoj okazas kadre de esperantorenkontiĝoj, kaj ne nur dum la hom-amasa Universala Kongreso de Esperanto, sed ankaŭ okaze de malpli grandaj renkontiĝoj. Ĝis nun okazis 37 sesioj en 30 landoj.

Ĉi-jare okazos ekzamen-sesio dum la baldaŭa Hispana kaj Andaluzia Kongresoj de Esperanto, okazontaj en la urbo Arundo (hispanlingve *Ronda*) en Malago. La ekzamenoj okazos la 3-an de majo (sabaton) ĉe la kongresejo mem. La niveloj pri kiuj okazos la ekzamenoj estos B1, B2 kaj C1. Kion oni bezonas por ekzameniĝi? Nur estas necese plenumi la formularon troviĝantan ĉe <http://www.edukado.net/alighilo?id=2014ES-ROND> kaj kompreneble veni en Arundon la proksiman 3-an de majo, krome oni devas pagi jenajn kotizojn:

Ekzameno B1: 68 eŭroj. Ekzameno B2: 74 eŭroj. Ekzameno C1: 84 eŭroj.

La ekzamenoj havas du partojn: skriban kaj parolan.

Okaze de la parola parto oni priantas:

- La komunik-kapablon de la kandidato, taŭgan reagon, konojn pri la temo.
- Leksikan riĉecon kaj laŭsituan uzon de la vort-trezoro.
- Lingvan korektecon.
- Aŭdan komprenon (en konversacio kaj appte laŭ sonregistraĵo).

Kaj dum la skriba parto:

- Lingvan korektecon.
- Skriban sinesprimon.
- Verkadon laŭ la komunika celo kaj ĝenrajn postulojn de la tasko (ekz. letero).
- Enhavan riĉecon.
- Enhavan kaj lingvan koherecon.
- Leksikan riĉecon kaj taŭgecon.
- Lingvan korektecon.
- Globalan kaj detalan komprenon de legita teksto.

Do, la organiza komitato de la Hispana kaj Andaluzia Kongresoj de Esperanto kuraĝigas ĉiujn interesitojn atingi oficialan diplomon, veni en Arundon kaj ekzameniĝi okaze de oficiala pruvo. Temas do, pri taŭga okazo por montri al ĉiuj, ke esperanto, se paroli pri oficialaj atestiloj, estas je la sama nivelo ol ĉiuj aliaj eŭropaj lingvoj. Cele atingi pliajn informojn, bv. viziti la TTT-paĝon: <http://www.edukado.net/>

*José María Rodríguez Hernández*





# Dokumentoj alvenintaj al la biblioteko en 2013 kaj komence de 2014

Dum la jaro 2013 kaj la du unuaj monatoj de 2014 eniris la bibliotekan katalogon sekvaj dokumentoj:

*Anonima donacinto:*

*Bildvortaro (DUDEN)*. FEL, 2012

*Beletra almanako (N. 16-18)*. Mondial, 2007-

Braga, Ismael Gomes. *Dicionário Esperanto-português*. Federação Espírita Brasileira, 1956.

Sampedro, José Luis. *José Luis Sampedro en mil y una lenguas*. Universidad Complutense, 2012.

Peláez, Pablo. *Printempo* [kompakta disko]. Infinity Estudios, 2012.

Kolker, Boris. *Vojaĝo en Esperanto-lando*. UEA, 2005.

Richet, Charles. *Sokrato*. Couteaux, 1914.

Donacinto: José Añó

Añó, José. *Abc̄ de Esperanto*. Añó, 2012.

Donacinto: *Jorge Camacho*

Cherpillod, André. *Atlantido*. Cherpillod, 1997.

Rosso, Vittorio. *Danteskaj itineroj*. Napola Esperanto-Asocio, 2001.

Berveling, Gerrit. *De duopo al kvaropo*. VoKo, 1995.

*Durruti*. Cercle espérantiste de l'Agenais "Laüte". 1981.

Sikosek, Ziko Marcus. *Esperanto sen mitoj*. FEL, 1999.

Sade, marquizo de. *Florville kaj Courval aŭ Fataleco*. Gilbert R. Ledon, 1992.

Ŝtimec, Spomenka. *Geografio de miaj memoroj*. Pro Esperanto, 1992.

Drezen, E. *Historio de la mondolingvo*. Ekrelo, 1931.

Mondpaca Esperantista Movado. *Impeto (n. '89, '90)*. Progreso, 1990-

Cherpillod, André. *Johana "d'Arko", Pucelino de Francio*. Cherpillod, 1996.

Steele, Trevor. *Kvazaŭ ĉio dependus de mi*. FEL, 2009.

Puŝkin, A. S. *La kapitanfilino*. Rudolf Mosse, 1927.

Berveling, Gerrit. *La unuaj 25 jaroj en mia memoro*. VoKo, 1994.

Seabra, Manuel de. *Malamu vin, unu la alian*. Mondial, 2009.

Polak, Leo. *Naturleĝo, pensoleĝo, morala leĝo*. Cercle espérantiste de l'Agenais "Laüte", 1984.

Szathmári, Sandor. *Perfekta civitano*. Hungara Esperanto-Asocio, 1988.

Collodi, C. *Pinokjo*. The Esperanto Publishing Company, 1930.

Cherpillod, André. *Po, la diabla vorto*. Cherpillod, 1996.

Bogdanov, A. *Ruĝa stelo*. SAT, 1929.

Declerck, Christian. *Spitaj - kiel hidrargo*. FEL, 2008.

Lenin, V. I. *Ŝtato kaj revolucio*. SAT, 1926.

Berveling, Gerrit. *Streĉitaj koroj*, VoKo, 1995.

Cherpillod, André. *Vortkonsisto, vortfarado, vortanalizo, vortordo*. Cherpillod, 1996.

Aĉetinto: *Madrida Esperanto-Liceo*  
Gautier, Dominique. *Esperanto* [DVD]. SAT, 2013.

Donacinto: *Carmen Suárez*  
Grigorov, Asen, red. *Esperanto-bulgara konversacilibro*. Nauka i izkustvo, 1972.  
Kilian, Th. *Esperanto: učebnice a čítanka*. Pokorný, 1933.  
Miyamoto, Masao. *La morta suito*. L'Omnibuso, 1984.  
Raspe, Rudolf Eric. *La vojaĝoj kaj mirigaj aventuroj de Barono Munchausen*. Rudolf Mosse, 1927.  
Miyamoto, Masao. *Skiza historio de la utao*. La Kritikanto, 1929.

Donacinto: *Fernando Millán Romeral*  
Millán Romeral, Fernando. *El poema del P. Tito Brandsma en esperanto e interlingua*. Edizioni Carmelitane, 2013.

Donacinto: *Federación Anarquista Ibérica*  
Hoarau, Andre. *El esperanto*. Federación Anarquista Ibérica, 2013.

Donacinto: *Ricardo Albert*  
Sigmond, Júlia. *Dialogo*. Exit, 2013.  
Sigmond, Júlia. *Nomoj kaj sortoj*. Exit, 2011.  
Rodin, Sen. *Nu, kaj do?* Exit, 2010.

Donacinto: *José María Salguero*  
Ostrovskij, Nikolaj. *Kiel ŝtalo estis hardata*. Sezonoj, 1997.

Donacinto: *Saksa Esperanto-Biblioteko*  
Rosegger, Peter. *Die Entdeckung von Amerika = La trovo de Ameriko*. Klag, 2010.

Donacinto: *Internacia Studumo pri Kulturo kaj Turismo*  
Wojtasik, Mieczysław. *Kolce życia = Pikiloj de vivo*. Skonpress, 2013.

Donacinto: *Benoît Philippe*  
Helfricht, Jürgen. *La Dresdena Sinjorina preĝejo*. Kava-Pech, 2003.

Donacinto : *I. Drul*  
Koň, Bohdan. *Senco de l' vivo*. [s.n.], 2012.

Donacinto: *Manuel Parra*  
*Pli sciu pri Hirosima*. Hirosima Esperanto-Societo, 2012.

Donacinto: *Lupe Sanz*  
*[Radiaj intervjuoj pri Esperanto]* [kasedo, hejma registrado].

# IOM PRI LA 3-a ĜENERALA JARKUNSIDO DE LA RETO EŬROPEANA

Kiel jam dirite en Boletín n-ro 404, la pasintan 2an de decembro okazis en Roterdamo la 3a Ĝenerala Jarkunsido de Europeana al kiu Hispana Esperanto-Federacio (HEF) estis invitita kiel provizanto de metadatenoj.

Partoprenis ĉirkaŭ 240 reprezentantoj el pluraj institucioj. Nome de HEF ĉeestis Ana Manero, kiel kunordiganto de la projekto Bitoteko. La partopreno estis senpaga por la membroj de la Europeana Reto kaj disvolviĝis en la roterdama kongresejo De Doelen. La sola laborlingvo estis la angla.

Post la akceptado, la kunsido komenciĝis en la ĉefa salono je la 9a kaj duono per la prezentado far la prezidanto de la Europeana Reto, Nick Poole, de la agado de la Reto dum 2013. Kiel ĉefajn atingojn li reliefigis la kreskon de aliĝintaj institucioj, sekve do, ankaŭ de bit-risurcoj atingitaj tra la datenbanko. Ĉi-kadre oni substrekis la avantaĝojn aparteni al la Reto: ricevi akuratan retpoŝtan informadon, aliri la nur-por-membran dokumentujon kaj aktive labori por la disvolvo de diversaj projektoj.

Poste, pluraj diversfakaj responsuloj de Europeana skizis la planojn por la estonto: plibonigi la kvaliton de metadatenoj, atingi pli da uzantoj, malfermi la pordon ankaŭ al kreaj industrioj, plu labori super la plurlingveco de la datenbanko (jen la devizo: “certigi, ke vi povas atingi mian kulturon per via lingvo”), ŝanĝi la arĥitekturon de la portalo por ke ĝi iĝu platformo kaj defii la malkreskon de la eŭropunia financado (monaj eltondoj kaŭzataj de la krizo) sen rezigni pri la disvolvo de novaj teknologioj kaj projektoj.

Inter la 10a kaj duono kaj 12a kaj duono okazis tri samtempaj laborkunsidoj. Ĉiu partoprenanto devis ĉeesti unu el ili. La unua temis pri rigardo al la sukcesa modelo de Europeana, la dua pri la allaso ankaŭ de kreaj industrioj al la Reto (ĝis nun konsistanta nur el kulturaj institucioj, jen publikaj, jen privataj) kaj la tria, kiun ĉeestis la reprezentanto de HEF, pri la plano establi nubobazitan sistemon por Europeana (vidu bildojn 1 kaj 2), kiu permesu malpli koston kaj pli daŭrigeblan infrastrukturon por stoki la metadatenojn kaj bitdokumentojn. La tasko de ĉi-tiu lasta laborgrupo estis diskuti ĝis kioma grado la institucioj konsentos liberigi la rajtojn kaj uzeblon, ne nur de iliaj bitdokumentoj, sed ankaŭ –kaj ĉefe—de la metadatenoj provizitaj de ili.

Inter la 12a kaj duono kaj la 14a estis tri pliaj laborkunsidoj okazintaj dum tagmanĝo. Ĉiu partoprenanto ricevis piknikan saketon tiucele. La unua laborkunsido pritraktis la temon Europeana kaj edukado, en la dua (ĉeestita de la reprezentanto de HEF) oni instruis kiel krei programeton por uzi en poŝtelefonoj kaj tabulkomputiloj per antaŭdifinitaj eroj el Europeana, ĉefe el nederlanda Rijksmuseum, kaj la libera programo Muse. La tria temis pri kundivido de ideoj kaj proponoj por la strategia plano ĝis la jaro 2020.


**Ana Manero**

---


Plia informo en: <http://blog.europeana.eu/2013/06/europeana-releases-first-free-ipad-app/> kaj <http://muse-open-source.org/>

---

Plia prelegoj far la responsuloj okazis denove en la ĉefa salono, ekde la 14a kaj duono, pri divido de konkludoj de la antaŭaj laborgrupoj, strategia plano ĝis 2020 kaj ronda tablo kun responsuloj de la Reto Europeana kaj reprezentantoj de la Fondaĵo Europeana kaj de la kreaĵ industrioj. Ĉirkaŭ la 16a finiĝis la kunsido post longa tago de intensa laboro. Paralele estis panela ekspozicio pri projektoj aliĝintaj al Europeana. Unuafoje tia ekspozicio okazas kadre de ĉi kunsidoj kaj ne estis multaj afiŝoj. HEF ja prezentis la sian.



1. Nuna situacio pri colectado de metadatenoj. La rilatoj ne estas Reciproka, ĝi estas kosta kaj nedaŭrigebla.



2. La projekto Europeana nuboj provas repensi ĉi situacion.

# CENT DATREVENO DE DON JUAN RÉGULO PÉREZ


Naskiĝinta en la jaro 1914, do tiu ĉi jaro 2014, estas la centjara datreveno de la naskiĝo de tiu ĉi eksterordinara esperantisto, kiun ni tute ne povas forgesi. Li, jam en la jaro 1933 Don Juan Régulo gvidis sian unuan Esperanto-kurson en Tazacorte (La Palma), kie li deĵoris kiel popollerneja instruisto. Sekvajare (1934) li mem gvidis samtempe plurajn Esperanto-kursojn en Tazacorte: unu specialan por laboristoj, en kiu partoprenis dudekon da lernantoj, alian por virinoj, en kiu ĉeestis 18 fraŭlinoj, kaj ankaŭ alian por infanoj kaj instruistoj.

En 1935 kdo. Régulo Pérez, krom aktivi en la instruado fariĝis ankaŭ ĵurnalisto, kaj kiel tia li redaktis ĉiusemajne progresisman politikan gazeton "Espartaco". Li estis ja homo progresema subtenanta firman idearon kaj tre batalema spirito en sia restado en la Duagrada Instituto pri Instruado, ja li estis prezidanto de asocio de maldekstraj studentoj "Universitata Lerneja Federacio" (FUE), kaj li ankaŭ apartenis al Sindikato de Instruistoj de Ĝenerala Unio de Laboristoj (UGT).



En monato julio 1936 eksplodis la intercivitana hispana milito, kaj dum la antaŭaj monatoj aperis en Las Palmas (Kanariaj Insuloj) la unua gazeto kun Esperanto-teksto, "Nia Idealo", kun karaktero laborista, kies ĉefredaktoro estis José Camino Oliva, kaj Esperanto-redaktoro Juan Régulo Pérez. La gazeto estis trimonata, sed aperis nur tri numeroj, la lasta apenaŭ unu monato antaŭ la komenciĝo de la interfrata milito. Samkiel en la tuta Hispanio, tuj post la milit-eksplodo Esperanto estis rigore malpermesita, (escepto en Zaragozo, kiu kvankam neaktiva, la prezidanto, komandanto Ramón de Salas, rigore tute ne toleris ke falangistoj parolu pri fermo de "Frateco").

Samideano Juan Régulo Pérez estis arestita en Santa Cruz de la Palma en majo 1937, kaj restis en karcero de tiu urbo dum unu kompleta jaro. Poste oni translokis lin al la prizono de "Fyffes" kaj poste estis denove translokigita al la karcero de Rota, kaj fine al la koncentrejo ĉe la nordo de Maroko (tiam teritorio sub hispana protektado), kaj tie li restis ĝis aprilo de 1940, kiam la milito jam estis de longe finita En prizono li neniam preterlasis profiti ĉiun okazon strebi por Esperanto.



Kiam Juan Régulo restis libera en 1940 post tri jaroj en prizonoj, li ne estis juĝita, ja neniuj akuzis lin pri ia ajn delikto, sed ĉar la frankistoj konsideris ke li ne simpatiis kun la reĝimo, la ŝtataj aŭtoritatoj ne permesis ke li reaktivu kiel instruisto en popollernejo. Li do decidis translokiĝi al la Laguna, kie, samtempe ke li private instruis, studadis Filozofion kaj Beleton en tiu Universitato. Fine ni aldonu pri s-ano Régulo, ke fininte siajn studojn, li ekinstruis en la Universitato de la Laguna kiel help-profesoro, kaj de tiam (1945) jam li rekomencis aktivadi en la Esperanta Movado, en kiu elstaris kiel unu el la plej gravaj universalaj figuroj...

Kaj post tiu kalvario de suferoj, kaj dank' al sia senhalta lukto por kariero, esperantista idealismo kaj propra sin supero, Don Juan Régulo estis: Dro pri Filozofio kaj Beletro, katedra profesoro pri Historio de la Hispana Lingvo en la Universitato de La Laguna; aŭtoro de dekduo da libroj pri Lingvo-scienco kaj pri Historio: unu el tiuj "Nobiliario de Canarias", kvarvoluma kun pli ol 4300 paĝoj. Li ankaŭ estas aŭtoro de pli ol 200 fakaj artikoloj en revuoj naciaj kaj internaciaj.

En la jaro 1969 okazis en La Laguna la 29an Hispana Esperanta Kongreso, li, prof. Regulo, tiam jam lasis la prezidon de la Esperanto-Societo de tiu urbo kun pli ol cent aktivaj membroj ĉar malsanis, sed ĝi, la Kongreso, estis organizita sub lia inspiro: oni prezentis brilan Esperanto-Ekspozicion en salono de la Ŝparkaso. Dum la inaŭguro HEF omaĝis al la Profesoro Juan Régulo pro lia laŭdinda tasko en la entrepreno tiel transcenda por nia Movado, kiu estis la Eldonejo "Stafeto", kiu jam estis publikinta sian 75an verkojn en Esperanto. Li, Don Juan, ricevis de la estraro de la Hispana Esperanto-Federacio artan surtablan lampon kun gravurita dediĉo, simpla tutkora esprimo de la justa dankemo de la hispana esperantistaro al homo, kiu tiel bone laboris por nia Idealo kaj al kiu tiom multe ni ŝuldas!! Lia prelego en tiu Kongreso, "Edukistoj kaj Esperanto" estis vera leciono pri praktikaj ideoj por la edukado kaj priskribo de la idealo esperantista, kaj kiel oni povas konduki la Movadon tra la Universitatoj por atingi la plej altan ŝtupon...

Don Juan Régulo estis akademiano-korespondanto de la Reĝa Akademio de la Historio, membro de pluraj Universitataj Institucioj.

Kiel esperantisto, jam antaŭ 1935, li estis eldonisto, membro de la Akademio de Esperanto, Honora membro de UEA, Rektoro de la Internacia Kongresa Universitato okaze de la Jubilea Kongreso de Esperanto en Varsovio, plurperioda komitatano "C" de UEA kaj membro de ties Internacia Ekzamena Komisiono.

Li estis la iniciatinto kaj eldoninto ekde 1952 de ĉiuj libroj kun la marko "Stafeto" ĝis proksimume 1976/1980, ĉirkaŭ 100 titoloj kun entute pli ol 20.000 presitaj paĝoj.

Pri la signifo de sia esperantista aktivado, li majstre verkis en la vol. 2 de "Serta Gratulatoria in homorem Juan Régulo" (festolibro eldonita liaomaĝe de la Universitato de La Laguna), dediĉita al esperantismo, de multaj famaj esperantistoj.

Profesoro Régulo Pérez estis ankaŭ membro de la "Akademio Internacia pri Sciencoj de San Marino", membro de la "Internacia Scienca Akademio Comenius", ktp

Dum 18 jaroj profesoro de Esperanto (ŝtate salariata) en Lingvo kaj Literaturo, en la samtitola katedro de li kreita en la Instituto pri Lingvoj ĉe la Universitato de La Laguna.

Mi, modesta esperantisto, kiu persone kontaktis kun li kiel ĉefredaktoro de "Boletin" kun mia bona amiko Miguel Fernández, okaze de la Hispana Esperanto-Kongreso restis tiel bone impresita, ke mi promesis neniam forgesi sian figuron, jen kial nun okaze de sia centjaraĝa datreveno de lia naskiĝo konsideris moralan devon rememori lin, kaj mi min sentas feliĉa rememorante iom la intelektajn profilojn de nia kanaria samideano.

Don Juan Régulo Pérez forpasis en la jaro 1993, sed lia intelekta figuro restas neforgesebla ankaŭ kiel esperantisto...

Antonio Marco Botella

# LA SONETO AMO KONSTANTE EĈ PRETER MORTO DE FRANCISCO DE QUEVEDO, KO- MENTITA DE MIGUEL FERNÁNDEZ

Se, sur la tereno de beletro, la hispanan Renesancon aŭ Unuan Oran Jarcenton (la 16an) karakterizas harmonia ekvilibro inter formo kaj enhavo, en la Dua Ora Jarcento (la 17a) apogeas konscie aplikata malekvilibro inter unu kaj la alia. La tiamaj hispanaj verkistoj uzas plue la literaturan lingvon kreitan en la Renesanco, sed submetas ĝin al intensa prilaborado, el kio ŝprucas la du grandaj literaturaj skoloj de la Baroko: la kultismo kaj la konceptismo, antipodaj inter si. Ja ambaŭ skoloj kultivas la malakordon inter formo kaj enhavo, sed ĉiu el ili tion faras diference disde la alia.

La kultismo, nomata ankaŭ gongorismo, ĉar Gongoro estis ĝia plej eminenta reprezentanto, perturbas tian ekvilibron per plipotencigo de la formo damaĝe al la enhavo. La intrigo de la kultismaj poemoj minimumas, sed aperas disvolvita laŭe al la muldiloj de ia stilo riĉega je splendaj tropoj kaj komparoj, je latinismoj kaj hiperbatoj, je sonoroj... Temas ja pri vera festeno por la sensoj, pri artfajro kun nekontestebla formala belo.

La konceptismo, kies korifeoj estis Francisco de Quevedo kaj Baltasar Gracián, rompas la ekvilibron inter formo kaj enhavo per plipotencigo de la dua damaĝe al la unua. Konceptistoj aspiras diri maksimumon da aferoj per minimumo da vortoj. Ilia devizo jenas: “Bona, se kurta, duoble bona; malbona, se kurta, ne tiel malbona”. En konceptisma poemo, la vortoj kaj esprimoj povas signifi multajn aferojn samtempe. Tiajn poeziaĵojn oni admiras pro la inĝenio, kiun ili evidentiĝas, kiam oni sukcesas kompreni ilin.

Kaj unu skolo kaj la alia postulas de la leganto grandan penon kaj grandajn kulturajn sciojn. La kultismo emas al vortoj, fraz-aranĝoj kaj sintaksaj strukturoj malfacile kompreneblaj; la konceptismo, sub simpla gramatika ŝajno, kaŝas ian surprizan plurecon de signifoj sekretaj kaj nesuspekteblaj; kaj ambaŭ skoloj praktikas mitologiajn aludojn, kiuj malebligas perfektan komprenon sen konsiderinda posedo de la greka-romia mitologio.

Dum Gongoro estas la pleja figuro de la kultismo, Quevedo kaj Gracián estas la plejaj lucernoj de la konceptismo. Por ĉi lasta skolo *koncepto* egalas procedon, per kiu ia poezia objekto, anstataŭ ricevi rektan prezenton, montriĝas en rilato kun alia objekto. Ekzemple, en la hispana, la vorto uzata por remilo (h. *remo*) samas kiel la vorto uzata kiel nomo de la legenda heroo, kiu, kune kun la frato, Romulo, fondis Romon, nome *Remo* (kaj en la hispana kaj en esperanto). Nu, Quevedo nomis la remilon “la frato de Romulo”. Ĉi-rimede do konceptistoj evitas la nomon de aferoj per ĉirkaŭparoloj kaj ties asociadoj al aliaj aferoj. La procedoj por efektiviĝi tiajn stilajn kapriolojn tre diversas. Uzatas metaforoj, komparoj, vorto-ludoj, dusenceco...

Mi ilustras tian grandan kompleksecon per prezento kaj komento de la poemo *Amo konstante eĉ preter morto*, en traduko de Fernando de Diego.

*Amo konstante eĉ preter morto*, rigardatas unu el la plej bonaj amsonetoj en la kastilia lingvo. Ni staras antaŭ verko absolute karakteriza de la konceptisma arto, sed, super ĉio, antaŭ neripetebla majstroverko. Malgraŭ ke la madrida poeto Quevedo konatas pro sia mizogineco (“prefere pastro venu por min entombigi, ol por min edzigi”), li estis pasi-plena homo, “la plej alta ampoeto el la hispana literaturo”, laŭ Dámaso Alonso.

Ja ĉe Garcilaso, en ties Eklogo III, vortumatas tiel senfina amo, ke ĝi supervivos la fizikan morton. Sed Quevedo iras transen. Sendube, neniu antaŭ li tiel kuraĝe defiis mortalecon. Lia aŭdaco havas rekomencon. Nur magra nombro da poemoj vekis tiom da intereso ĉe la fakularo kaj ĉe ne tiel doktaj homoj, kiuj neniel dubas, ke tiu amsoneto pintas en la literaturo pri la fatala destino de la homo.



Nedubblas la majstreco de Quevedo sur la tereno de la sonet-arto. Tradicie, la vers-kvaroj starigas temon, kaj la vers-trioj solvas ĝin. Kelkfoje, la madridano sekvas tian skemon. Alifoj, kaj ĉiam pli proksima al virtuozecko, la poeto solvas la situacion vortumante la ĉefideon en la lasta vers-trio. Tia varianto venas el la petrarkisma tradicio. Quevedo ĝin transiras. Quevedo resumas la tutan ĉefideon en nur la lasta verso, kaj eĉ pli, en la du lastaj vortoj: li ĝojas, ĉar postmorte li fariĝos “polv’ enamiĝinta”. Bedaŭrinde, pro rim-kialoj, Fernando de Diego neprecize redonis la lastan vorton, *enamorado* (enamiĝinta), de la originala poemo, montrantan la triumfon de la amo super la morto. Lia *adora* aperas pala kaj eĉ misgvida. Sed kiu povus plibonigi la laboron de la majstro F. de Diego, aliflanke admirindan? Kompreneble, ne mi.

La poemon mi prezentas kune kun proza parafrazo miapluma, kiu, mi esperas, iom klarigos, krom la tipoj de kleoj kaj ŝlosiloj uzataj ĉe la ateliero de Quevedo, la enhavon de ĉi soneto kaj evidentigos la enorman aŭdacon, kiun signifas entrepreni la tradukon de liaj netradukeblaj kaj nekredablaj konceptismaj jonglaĵoj.

---

*mortala*: ne senmorta, devanta iam morti. (*Neologisma vortaro*).

---



## AMO KONSTANTE EĈ PRETER MORTO

(En traduko de Fernando de Diego)

Okulojn miajn povos fermi fina  
ombro, suĉanta helon de la tago  
kaj –hor’ feliĉa kaj bonvena ago–  
el mi elsoros la esenc’ anima.

Sed cis ne lasos la spirit’ obstina  
memoron, ekzaltatan de l’ imago:  
eĉ frida-akve naĝas mia flagro  
ne obeante al postul’ destina.

Animo mia longe di-prizono...  
Sang-tajdoj varmaj en pulsad’ fervora,  
medoloj, kiuj ardis sub glori-krono...

Ĉi korpo mortos, ne la sento kora;  
cindriĝos, ne la am’, sed la persono;  
mi estos polvo, tamen polv’ adora.

(Proza parafrazo far Miguel Fernández)

*Miajn okulojn povos fermi la morto, kiu similas al fina ombro kapabla suĉi la blankan lumon de la tago, nome forpreni de mi la vivon. Same, la horo de la morto povos disigi mian animon disde la korpo. Tia horo estos bonvena al la animo kaj feliĉigos ĝin, ĉar ĝuste tia horo kontentigas ties sopiron al morto-veno, ĉu pro tio, ke la animo ne atingas la deziratan amon, ĉu pro tio, ke la animo, kiu kuŝas kvazaŭ enfermita en la karceron de la korpo, finfine sentos sin liberigita, laŭe al juda-kristana koncepto, ale al la eterna vivo.*

*Perdi la memoron egalas morton. Laŭ la antikvaj grekoj, mortintoj, antaŭ ol eniĝi en Hadeson, devas transiri i.a. la riveron Leteo. Cise de ĝi, ĉe la river-bordo de l’ vivantoj, restas ĉiuj memoroj pri la eksa vivo, transe restas nur forgeso. Nu, mia animo certe revenos el la riverbordo de l’ mortintoj al la river-bordo de l’ vivantoj por repreni miajn memorojn pri amo. Mia animo, danke al la flamo de la amo, per kiu ĝi senfine brulis, scipovas naĝi frida-akve, ne obeante la postulon de l’ destino, severan leĝon, kiu malebligas reveni el la regno de l’ mortintoj kaj rememori.*

*Tiumomente, mia animo, kiu longe estis prizono de dio nomata amo, rekuniĝos kun mia varma sango ankoraŭ en pulsado kaj kun la medoloj de mia korpo, kiuj ĉiam glori ardis en pasio, kaj tiuj materiaj partoj mortos kaj transiĝos al polvo. Al polvo, jes, sed polv’ enamiĝinta (“adora”).*

Miguel Fernández

---

El Fernando de Diego, *Samtempa simfonio*, n-ro 3 de la kolekto Hispana Literaturo, Ediciones “La Misma”, Madrid, 1987, p.58.

---

# ALIĜILO

73-a HISPANA ESPERANTO-KONGRESO  
kaj 18-a Andaluzia Kongreso RONDA  
de la 1-a ĝis la 4-a de majo 2014

Plenumu tiun ĉi aliĝilon, kaj komuniku ĝin al la asocio AEU en Malago. Oni povas sendi ĝin (aŭ simple la datenojn) per e-mesaĝo al [kongreso@esperanto.es](mailto:kongreso@esperanto.es) aŭ al fizika adreso de la asocio: Asociación Andaluza de Esperanto AEU Calle Ánfora, 6-5-D 29013-Málaga (Hispanio)

PERSONA NOMO ..... FAMILIA(J) NOMO(J).....  
ADRESO .....  
URBO.....(.....) LANDO.....  
RETADRESO.....  
TELEFONNUMERO(J) .....  
MEMBRO DE HEF Jes Ne NASKIĜDATO ..... (nedevige, nur por statistiko aŭ rabato)  
ALIAJ RABATOJ.....  
DATO DE PAGO..... MANIERO DE PAGO.....  
KOTIZO.....  
ALIAJ.....  
DONACO.....  
SUMO.....

KOTIZOJ	Aliĝo ĝis la 31-a de januaro <sup>(1)</sup>	De la 1-a de februaro ĝis la 31-a de marto	Post la 31-a de marto kaj surloka aliĝo
Membroj de HEF aŭ AEU	35	45	55
Ne membroj de HEF	45	55	65
Juna membro de HEF (malpli ol 30) <sup>(2)</sup>	25	35	45
Junulo nemembranta en HEF (malpli ol 30)	30	40	50

Pagu la kotizon en jena bankokonto indikante la tekston "Kongreso" kaj vian nomon en la bankokonto:  
2031 0225 54 0100187657 Caja General de Ahorros de Granada (se vi estas en Hispanio)  
Por pagi eksterlande bv. uzi jenan kodon: IBAN ES80 0487 3225 1420 0000 6979 //SWIFT/BIC :  
GBMNESMMXXX

(1) La efektiva dato estos tiu de ricevo de pago.

(2) Sama rabato estas aplikebla al lernantoj de Esperanto ĉeestantaj kursojn organizitajn de grupoj aliĝitaj al HEF, komenciĝintajn inter septembro 2013 kaj aprilo 2014.

**Senpaga aliĝo (naskiĝintoj post la 31/12/89 kaj akompanantoj de handikapuloj)**